REGo

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

en la numero

tra Rusio al Mongolio
9000 kilometrojn tra Eŭropo
nova kanto de Mikaelo Povorin
90-jara jubileo de Vladimir Edelŝtejn
ekde 2011 aperos elektronika REGo-abono
"Bulteno de REU", novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo, 2010

enhavo

01 Tra Rusio al Mongolio (T.Loskutova)
04 Transsiberia vojaĝado (L.Gabalda)
06 Bovenon al TILE-6!
07 9000 kilometrojn tra Eŭropo (S.Smetanina)
09 Naciaj diraĵoj E-veste (parto 10)
17 Aŭtuna renkontiĝo en Jekaterinburg (R.Kudrjavceva)
18 Tagil artfajras. Ĉu omaĝe al esperantistoj? (M.Karceva)
22 Io pri mi (V.Edelŝtejn)
24 Komparoj kaj impresoj pri du naciaj kongresoj (R.Kudrjavceva)
28 Velura GelERT-2010 (M.Kocarj)
30 Proverb-tradukoj, por via atento, sed sen komento. (A.Gonĉarov)
35 La Estraro decidis... (G.Arosev)
36 Havana UK en la reta kinejo
36 La 96-a UK: aliĝkompanjo jam startis aktive
36 UEA gratulis la novan polan ŝtatestron
37 Usona romano en kiu agas esperantistoj
37 Forpasis la dojeno de la Honoraj Membroj de UEA
38 Kotizoj de REU por 2011 kaj novaj membrokategorioj (G.Arosev)
38 Novaj REU-membroj por 2010
38 Korekto
39 Kotizoj de REU/REJM por 2011
40 REGo – nova abonkosto kaj nova abonebleco (G.Kokolija)
40 IJK en Ukrainio (M.Lineckij)
41 Esperanta organizaĵo por UN ekfunkcias
41 9-a Internacia Himalaja Renkontiĝo
42 Forpasis Ŝaik Mamedov
43 Novaj ĉapitroj el "La urbo Goblinsk" (M.Bronŝtejn)
55 Nova kanto de Mikaelo Povorin
21, 31, 56 Anekdotoj
k3 Nova aspekto de la retejo de REU (G.Arosev)
k3 Nova kolora libro de "Impeto"
k4 Uljanovska E-klubo gratulas REGon

precize antaŭ 10 jaroj, en oktobro de la jaro 2000, aperis la unua numero de
Rusia Esperanto-Gazeto

REGo
(Rusia Esperanto-Gazeto)
№ 5 (60) oktobro 2010
aperadas ekde 2000

redaktas **Garik Kokolija**
kunredaktas **Viktor Aroloviĉ**
kunlaboras **Maksim Griŝin**

materialoj de REGo povas esti represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso: <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2011:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 450 rubloj sendendaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва
por loĝantoj de aliaj landoj – 25 eŭroj pagendaj al la konto ***kklg-r*** *ĉe UEA*
elektronika abono *– 200 rub. (5 eŭroj)*



NOVA ASPEKTO DE LA RETEJO DE REU

Ekde septembro nia retejo <http://reu.ru/> akiris alian aspekton – multe pli modernan kaj plaĉan. La kolosan laboron idee kaj programiste efektivigis Andrej Grigorjevskij, al kiuj ni ŝuldas multajn dankojn.

Inter la novaj eblecoj, nun liverataj de <reu.ru>, estas: facila kaj rapida aldono de anoncoj pri novaj E-renkontiĝoj; tuja rigardo al informoj pri membroj, kluboj kaj grupoj, aliĝintaj al REU; videomesaĝoj (dulingvaj specimenoj kun mia "salutvorto" jam estas en la retejo); biblioteko: ege perspektiva parto de la retejo. Nun tie estas (fakte, preskaŭ specimen-cele) preneblaj du libroj (pdf-formate) kaj unu sonlibro (mp3-formate), sed estonte ni planas loki tie por libera "aliro" ĉion, kion ni povos (kun respekto de la aŭtora rajto, kompreneble). Notu, ke ankaŭ ekzistas ruslingva biblioteko, kaj tiea enhavo estas malsama ol tiu en la E-parto; kaj multo alia.

Certe restis ĉiuj malnovaj rubrikoj – dokumentoj, membrolistoj, novaĵoj ktp. Post iom da tempo en la nova retejo aperos ankaŭ arkivo de REGo kaj aliaj interesaj aferoj.

Okaze de notitaj mankoj aŭ misfunkcioj skribu al <informado@reu.ru>.

G.Arosev, la Prezidanto de REU

NOVA KOLORA LIBRO

Ŝipeto Narklo. ***Dmitrij Ŝevĉenko, Anna Striganova.*** Kolora bildfabelo en Esperanto. Moskvo: Impeto, 2010. 56 paĝoj, ilustrita; ISBN 978-5-7161-0210-1

Neniu kaj neniam ekkonos veran solecon, ĝis aperos sola en la nokta maro. Kiam akvo kaj ĉielo kuniĝas en unu senfinan, netravideblan mallumon. Sed sufiĉas nur unu fojon ekvidi tion, kaj tiam ĉiu minuto travivita kun iu apude iĝas por oni valora. Narklo estis simpla malnova ŝipeto, forlasita en la maro, ĝi povus rompiĝi je la rokoj, sed aperis miraklo, kaj ĝi ekvivis, ne sciante, ke en la mondo ekzistas bordoj.



Loĝantoj de Rusio povas mendi la libron en retbutiko de la eldonejo "Impeto" <http://lernolibro.ru>.

la eldonejo "Impeto"

Uljanovska urba E-klubo tutkore gratulas REGon okaze de la dekjara jubileo kaj deziras ĉion bonan!

Ho, junularo!
Verku rakontojn, versaĵojn
Pri via vivo!

Nur en la REGo
Estas ĉiam legeblaj
Bonaj informoj.



La 26-an de novembro nia klubano Aleksandr Ivanoviĉ Bikov festos sian 70-jaran jubileon. Uljanovska E-klubo tutkore gratulas lin kaj deziras al li sanon, multajn jarojn, multajn sukcesojn (ankaŭ en E-movado) kaj feliĉon!

Al REGo

(preskaŭ en hajko-stilo)

Jar' jubilea
Estu sukcesa por REG'!
Niajn gratulojn!!!!

La redaktoroj
Problemojn ne havu plu
Pri legantaro!

Spertaj aŭtoroj
Versaĵojn, fabelojn, fablojn
Verku por REGo!

Ankaŭ la fotoj
Pri Esperanto-agad'
Estas amuzaj.

Estu per REGo
nia viv' Esperanta
pli interesa!

Se interesa
Por vi viv' nia estas,
Legu la REGo-n!

Certe, ni ne estas bonaj poetoj, tamen pro tio niaj gratuloj ne iĝas malpli sinceraj.

Fruktodonajn jarcentojn!